**Protokolo de la 35-a Ĝenerala Asembleo**
de la Scienca Sektoro de AIS San-Marino, okazinta en la LEUKAIS-akademidomaro en Komárno, 2006-09-02, 16:00–17:00.
Ĉeestas jenaj efektivaj membroj: profesoroj Angstl, Fössmeier, Maitzen, Poláková, Quednau, Wickström; pluraj aliaj AIS-anoj havas ĉeestrajton.
1. *Formalaĵoj.* Ĉar nek la prezidanto nek la vicprezidanto povas ĉeesti, la asembleon gvidas senatano OProf. Quednau. La ĜA estis laŭorde kunvokita kaj do estas kvoruma. Protokolo: Fössmeier (protokolofico).
2. *Ĝenerala raporto.* OProf. Quednau raportas pri la evoluo de la kunlaboro de AIS kun AKB (Pollando), IUK (Bulgario) kaj ULBS (Rumanio) kaj pri kunlaborproponoj ricevitaj el Kubo kaj Ukrainio.
3. *Financa raporto 2004.* Trezoristo OProf. Wickström prezentas la spezokalkulon kaj la bilancon por 2004. Ĉar la komunutileco de AIS laŭ germana juro estas suspendita, malmultaj donacoj estis ricevitaj. Pro la subteno de la AIS-klerigejoj en Karlovo kaj Sibio okazis malgranda malgajno, kiel planite.
Revizoro Macko raportas, ke OProf. Lobin kaj li kontrolis la librotenadon kaj trovis ĝin en bona ordo kaj sen eraroj. Li proponas senŝarĝigon, prokrastitan de la lasta asembleo, de la estraro por la jaro 2004. La asembleo akceptas.
*4. Decido pri regularŝanĝoj.*
4.1 La komisionoj pri regularŝanĝoj ankoraŭ ne finis sian laboron; proponoj pri la ekzamenregularo, la studadregularo kaj la kunsidregularo estis prezentitaj interrete kaj estas diskutataj.
4.2 La senato proponas jenan modifon de la alvokoregularo: La deĵortempo de eksterordaj profesoroj (EProf.) finiĝu ĉiam kun la senatperiodo; la nova senato decidu pri plilongigo. Sur la alvoko-dokumentoj ne aperu findato. – La asembleo unuanime akceptas.
5. *Ceteraĵoj.* Elektoj ne okazas. Aliaj aferoj ne estas traktendaj.
Komárno, 2006-09-02
*H.-D. Quednau,, kunsidestro*
*R. Fössmeier, protokolofico*

**Protokolo de la 58-a senatkunsido**
(la 52-a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de la XII, la 61-a post la fakta eklaboro) okazinta en la LEUKAIS-akademidomaro en Komárno (SK) dum SUS 29. Kunsidtempoj kaj ĉeestantoj:
- Dimanĉon, 2006-08-27, 10:10–10:50; senatanoj Fössmeier, Quednau; vicsenatanoj Angstl, Poláková.
- Merkredon, 2006-08-30, 18:15–19:00; senatanoj Fössmeier, Quednau; vicsenatanoj Angstl, Poláková.
- Ĵaŭdon, 2006-08-31, 19:20–20:35; senatanoj Fössmeier, Quednau, Wickström; vicsenatano Poláková.
- Sabaton, 2006-09-02, 10:10–11:00; senatanoj Fössmeier, Quednau; vicsenatanoj Maitzen, Poláková.
*1. Formalaĵoj.* Dum ĉiuj kunsidoj ĉeestas almenaŭ kvar senatanoj kaj vicsenatanoj, do la Senato estas kvoruma. Pro la malsano de prezidanto OProf. Frank kaj la neĉeesto de vicprezidanto OProf. Minnaja la kunsidon gvidas OProf. Quednau kiel plej aĝa ĉeesta senatano. Protokolas OProf. Fössmeier.
*2. Kompletigo de la ekzamenofico.* Dum SUS 29 la ekzamenofico havu jenajn nekonstantajn membrojn: PDoc. Vojáček (sekcio 1), ADoc. Tanc (2), ADoc. Macko (4), ADoc. Bojaĝieva (5), EProf. Lewanderska-Quednau (6). Sekcio 3 ne estas reprezentata en la anaro de SUS 29.
*3. V4-konferenco pri lingvo-politiko.* OProf. Poláková raportas pri lingvo-politika konferenco de la Visegrád-ŝtatoj, kiu okazos fine de novembro en Bratislavo, kaj proponas la aŭspicion de AIS. Unuanime akceptita.
*4. Kontrakto kun IUK Karlovo.* La direktoro de ESPERINFORM-BL, EProf. Leonov, proponas precizigan aldonon al la kontrakto de 2005-05-12/20 pri la agado de AIS en Bulgario. La aldono estas unuanime akceptita. Ĝi aperas en apendico al la protokolo.
*5. Kontrakto kun ISTK.* La Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz proponis al AIS kontrakton pri reaktivigo de la kunlaboro. La senato unuanime decidas modifi la proponon, precipe por certigi, ke

mono de AIS ne trairu la kontojn de ISTK. La modifita propono, kiu aperas apendice al la protokolo, estu prezentita al ISTK por subskribo.

*6. Akademiaj solenaĵoj.* Pro la malsano de prezidanto OProf. Frank la solena fermo de SUS 29 okazu en sobra kaj solena etoso. Unuanime akceptita.

*7. Regularoj.* La senato proponas al la ĜA jenan modifon de la alvokoregularo: La deĵortempo de eksterordaj profesoroj (EProf.) finiĝu ĉiam kun la senatperiodo; la nova senato decidu pri plilongigo. Sur la alvokodokumentoj ne aperu fin-dato. La senato unuanime akceptas la proponon. Per du voĉoj kontraŭ du ĝi malakceptas proponon, ke EProf-dokumentoj indiku sciencan fakon. La senato diskutas la proponitajn modifojn de la ekzamen-regularo, kiuj estis jam legeblaj interrete, sed ne sukcesas fintrakti ilin en la disponebla tempo. Pri la diskutita parto okazas interkonsento. La diskuton de la ceteraj partoj finfaros la komisiono instalita en marto.

*8. Agado en Bosnio-Hercegovino.* ADoc. Dr. Preradović pretas labori pri fondo de AIS-filio en la universitato de Banja Luka (BA). OProf. Quednau proponas tiucelan nomumon de ADoc. Preradović kiel EProf. En okazo de urĝa neceso la senata sekretario subskribu provizoran dokumenton. Unuanime akceptita.

*9. Agado en Kubo.* La senato taskas OProf. Wickström, kontakti s-ron Mario Lázaro Azcuy en Kubo, kiu proponis kunlaboron, kaj esplori la eblojn. Unuanime akceptita.

*10. Sesia programo.* OProf. Quednau proponas, ke la spontanee okazinta kurso de EProf. Lewanderska-Quednau pri „nuntempaj rolo kaj tasko de la socikibernetiko" apartenu al la krom-SUS-a programo de la 6-a sekcio kaj valoru 0,5 stu. Unuanime akceptita.

Komárno, 2006-09-02

*H.-D. Quednau, kunsidestro*

*R. Fössmeier, protokolanto*

---

**Protokolo de la Asembleo de la Subtena Sektoro** okazinta 2006-08-27, 16:15–17:00, kaj 2006-08-31, 18:00–19:15 en la LEUKAIS-akademidomaro en Komárno, dum SUS 29.

1. (*Formalaĵoj*). Ĉeestas la subtenaj membroj Fössmeier, Leonov (por Bulgara AIS), Macko, Poláková (por Slovaka AIS), kaj Quednau. Dum la unua kunveno ne ĉeestas estrarano; post diskuto sub gvidado de OProf. Quednau ĝi decidas prokraston al 2006-08-31.

Tiun duan kunsidon gvidas la aganta direktoro OProf. Wickström. Ĉeestas ankaŭ revizoro OProf. Lobin, kun aldona voĉo de AIS Rumanio. Ne plu ĉeestas EProf. Leonov, kiu transigis sian voĉon al OProf. Quednau. Pri kvorumeco ne estas dubo, la tagordo estas akceptita. La kunveno okazas nur en ILo. La protokolon verkas OProf. Fössmeier.

2. (*Ĝenerala kaj financa raportoj*) OProf. Wickström prezentas la finkalkulon pri 2004, kiu estis kontrolita de la revizoroj Lobin kaj Macko. La asembleo diskutas detalojn de la kalkulo. OProf. Lobin dankas al la direktoro pro lia bona laboro kaj proponas akcepton de la bilanco kaj la spezokalkulo kaj senŝarĝigon de la estraro por 2004. La asembleo akceptas sen kontraŭvoĉoj.

3. (Ceter*aĵoj*) La regula asembleo 2007 okazu en la loko de SUS 30 la 4-an de septembro 2007.

*Kunsidestro: OProf. Bengt-Arne Wickström*

*Protokolanto: OProf. Reinhard Fössmeier*

---

**Raporto pri la sekcikunsidoj**

de AIS San Marino, okazintaj dum SUS 29 en la LEUKAIS-akademidomaro en Komárno, 2006-08-28, 20:00–21:00.

Okazis sekcikunsidoj de sekcioj 1, 4, 5 kaj 6. De sekcioj 2 kaj 3 ne ĉeestis efektivaj membroj.

**Sekcio 1**

Sub la gvido de dekano OProf. Poláková la kunsido bonvenigis la anoncon de ASci. Robert Baber pri partopreno en SUS 30 kaj proponis rangoaltigon post lia aktiviĝo.

Fine de la kunsido okazis kunsido de la ĉeestantaj TAKIS-anoj; pro la nuligo de la ĉijara TAKIS-kongreso. Ili decidis, ke jarfinan kunsidon de TAKIS iniciatu la ĝisnuna prezidanto OProf. Eva Polakova, kiu antaŭe gvidu retan diskuton pri la estonteco de TAKIS kaj pri elektado de nova estraro por la jaroj 2007–2009.

**Sekcio 4**

En la kunsido, gvidata de dekano OProf. Angstl, ne okazis decidoj.

**Sekcio 5**

En la kunsido, kiun gvidis dekano OProf. Maitzen, okazis jenaj decidoj:

- Dr. Ieva Ŝvarcaitė iĝu ADoc. pri fizika geografio.
- Mag. M. Vrhovac iĝu ASci. pri maŝinkonstruado.
- Propono al la senato, ke alvokodokumentoj de eksterordaj profesoroj ne portu limdaton.
- Rezerva propono por la loko de SUS 30 estu Bulgario.

**Sekcio 6**

En la kunsido, kiun gvidis dekano OProf. Lobin, okazis jenaj decidoj:

- Marcel Delforge iĝu ASci. pri eŭrologio en fakaro 6.3
- Anstataŭ la forpasinta vicdekano, OProf. Grego, estis elektita EProf. Lewanderska-Quednau.
- EProf. Leonov estis elektita kiel vicfakarestro de fakaro 6.2 (ilarmorfologio); tiun decidon la kunsido faris anstataŭ la ne-okazanta fakar-kunsido.

---

Apendicoj al la senat-protokolo

**Kontrakto**
inter
Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS)
kaj
ESPERINFORM BL Karlovo (BG)

1) La Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS) kaj ESPERINFORM BL Karlovo subskribas tiun ĉi kontrakton kiel daŭrigon kaj aldonon al la kontrakto de la jaro 2000 pri la agado de la klerigejo de AIS en Karlovo (Internacia Universitato Karlovo) kiel centro de AIS por distanca edukado en Bulgario.

2) Estas starigota scienca konsilio de la klerigejo en Karlovo, kiu estos ĝia gvidorgano kaj konsistos el

●·OProf. Dr. Hans-Dietrich Quednau (DE), prezidanto
● EProf. Boĵidar Leonov (BG), direktoro de la klerigejo
● EProf. Alicja Lewanderska-Quednau (DE / PL), vicdirektoro de la klerigejo
● OProf. Dr. Carlo Minnaja (IT)
● OProf. Dr. Reinhard Fössmeier (DE)
● OProf. Dr. Eva Poláková (SK)
● EProf. Dr. Nikolaj Ralev (BG)
● Prof. Tamara Petrovna (RU)

3) Studfakoj de la klerigejo estas: turismiko, esperantologio, eŭrologio, ergonomiko, aplika medicino, informadiko, komputilaj sistemoj, internacia patenta juro, bibliografio, scienc- kaj patent-teknika informado, merkatekonomiko, kaj administradscienco, pedagogio, filozofio, interlingvistiko, muziko kaj arto, ekologio, biometrio, ĵurnalistiko, teologio, teknikaj sciencoj.

4) AIS rajtigas ESPERINFORM BL Karlovo zorgi pri la administrado, librotenado kaj eduka agado de la klerigejo.

5) La studentoj dezirantaj studi surbaze de AIS-programo pagas la kotizojn por la studentaj legitimiloj de AIS. ESPERINFORM BL transpagas la kolektitajn kotizojn al AIS.

6) AIS rajtigas prof. Boĵidar Leonov subskribi la dokumentojn, kiuj certigas la semestran kaj jarfinan edukadon de la studentoj.

7) La studentoj studas surbaze de la aprobita studadprogramo kaj rajtas ekzameniĝi por akiri la gradojn de bakalaŭro, magistro kaj doktoro surbaze de la regularo de AIS. Surbaze de tiuj ekzamenoj kaj diplomlaboroj la studentoj ricevos diplomojn de AIS.

8) Ĉiujare estos organizitaj en Karlovo studadsesioj de AIS surbaze de la regularo de AIS.

9) La klerigejo kunagos kun bulgaraj kaj eksterlandaj universitatoj surbaze de la leĝaj kondiĉoj en Bulgario.

10) La kontrakto estas subskribita en du samvalidaj ekzempleroj, por AIS kaj por ESPERINFORM BL Karlovo.
Nome de AIS*: OProf. Dr. H.-D. Quednau, direktoro de la Klerigofico*
Nome de ESPERINFORM BL*: EProf. Boĵidar Leonov, direktoro*

**Kontrakto pri kunlaborado**

inter

Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino

kaj

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK)

Rezulte de 15-jara instruado en ISTK kaj 10-jara kunlaboro kun AIS oni decidas daŭrigi tiun-ĉi kunlaboron laŭ jenaj ĉefaj principoj:
1) ISTK ebligas al AIS varbadon de ĉiuj ISTK-studentoj por studado ĉe AIS laŭ ĝia regularo (studentiĝkotizo 0,5 Aku; en 2006: 32.50 €), ekzamenkotizoj rabatitaj laŭ la regularo de la jaro de la studentiĝo [por 2006 = 75 % en certaj landoj]
2) Tiuj studentoj, kiuj aliĝas al AIS-studado, formas la studentaron de AIS-klerigejo Bydgoszcz (AKB). AKB laboras sub gvido de Scienca Konsilio: OProf H.-D. Quednau, OProf G. Lobin, OProf R. Mielcarek, AProf A. Sudoł, AProf A.Kowalczyk, OProf. E. Poláková, EProf. A. Lewanderska-Quednau.
3) Ĉiuj AIS-studentoj rajtas sen aliĝkostoj partopreni ĉiujn studadsesiojn de AIS (SUS, BUS, AIS-studadsesioj sen finaj ekzamenoj). La saman rajton havas ĉiuj studentoj de ISTK, se la studadsesio okazas en Bydgoszcz.
4) La administran kaj programan agadon de AKB prizorgas programkonsilio de ISTK nome de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, kadre de kiu funkcias jure ISTK kaj AKB. Laŭ pola eduka leĝo ISTK estas registrita kiel postmatura lernejo, kies diplomojn agnoskis Pola Ministro pri Edukado la 1-an de aŭgusto 2001.
5) Ĉiujare, se estas almenaŭ 5 ISTK- aŭ AKB-studentoj, kiuj kandidatas por bakalaŭriĝo ĉe AIS, okazas bakalaŭraj fin-ekzamenoj en Pollando aŭ alia lando, kiu estas sen gravaj vizaj problemoj atingebla por ĉiuj sin anoncintaj kandidatoj. Tri monatojn antaŭ la ekzamena sesio devas esti ĉe la ekzamen-ofico de AIS la ekspertizoj de la 5 kandidatoj aŭ deklaro de la patrono, ke li ricevis la verkon kaj bontempe disponigos ekspertizon. Se en iu studjaro AIS escepte ne povas organizi tian ekzamen-sesion kaj nur pro tio iuj kandidatoj ne povas ekzameniĝi kaj retiriĝas, AIS repagas al ili ilian studentiĝ-kotizon.
6) ISTK je sia propra kosto okupiĝas pri informado pri ISTK- kaj AIS-studoj en AKB, kio ebligas, ke AKB estas la unua klerigejo de AIS en la mondo kun ĉiutaga instruado en Esperanto.
7) AIS havas la rajton akceptadi ankaŭ kotizojn por la studado en ISTK/AKB. Tiam AIS rajtas konservi 50 % de la studadkotizo kaj nur la aliajn 50 % transpagi al ISTK-konto.
8) La AIS-agadon en Bydgoszcz (AKB) estras la direktoro de la klerigofico de AIS, OProf H.-D. Quednau, kaj administrajn-organizajn AIS-aferojn en AKB prizorgas ASci R.Grzębowska kunlabore kun la Programa Konsilio de ISTK por plej bone solvi ĉiujn administrajn problemojn de AIS en Bydgoszcz.
9) Ĉiu AKB-studento rajtas peti ĉiun fake kompetentan kaj laŭ AIS-regularo rajtigitan AIS-docenton, patroni lian studfinan laboraĵon.
Nome de ISTK: *ASci. A. Grzębowski*
*Prezidanto de la programkomisiono*
Nome de la klerigofico de AIS*: OProf H.-D. Quednau, direktoro de la klerigofico*
Nome de la senato de AIS: *OProf. R. Fössmeier, Senata Sekretario*